# *Rusio asertas havi indicon ligantan teroristojn al Ukrainio*

*Image not found or type unknown*

Havano, mar  29 (RHK) La Rusa Enketa Komitato asertis havi signojn de ligoj inter la teroristoj, kiuj atakis la koncertejon de la Urbodomo de Crocus, proksime de Moskvo, kaj ukrainaj naciistoj.

"Sekve de laboro kun la arestitaj teroristoj, studado de la teknikaj aparatoj konfiskitaj de ili kaj analizado de informoj pri financaj transakcioj, pruvoj de ilia rilato kun ukrainaj naciistoj estis akiritaj", diras la deklaro.

Enketistoj konfirmis, ke "la krimintoj de la terorisma atako ricevis grandajn monsumojn kaj kriptajn monerojn el Ukrainio, kiuj estis uzataj por prepari la krimon."

Same, la Enketa Komitato de la Rusa Federacio raportis, ke alia suspektato, implikita en la financado de la terorisma atako kontra? la Urbodomo de Crocus, estis identigita, kaj postulos lian preventan areston.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/350876-rusio-asertas-havi-indicon-ligantan-teroristojn-al-ukrainio

**Radio Habana Cuba**